„Mutig vorwärts!“ **Aŭstria** „Kuraĝe antaŭen!“

# Esperantisto

## (Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Asocio

**6a jaro. Noj. 8/9 Monata Aug./sept. 1929**

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. Ŝ 4.80, germanlandanoj RM 3.25 alilandanoj sv. fr. 4.25, ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

# »Antaŭkongreso al la XXI-a« kun »Malfermo de Intern. Esperanto-Muzeo en Wien«.

Wien, 30. julio—2. aŭgusto 1929.

**Protektoro:** Prezidanto de la Respubliko Aŭstrio, Wilhelm Miklas.

## Internacia Honora Komitato:

**Aŭstrio:**

Kanceliero Ernst Streeruwitz
Ekskanceliero d-ro Ignatz Seipel
Ministro por Instruado d-ro Czermak
Eksministro p. Instruado Schmitz
Ministro p. Komerco d-ro Schürff
Landestro kaj urbestro de Wien Karl Seitz
Landestro de Niederösterreich d-ro Buresch
Eksministro, landestro de Stirio d-ro Rintelen
Ĉefepiskopo de Wien, kard. d-ro Piffl
Ekskanceliero, policprez. Schober
Sekcia ĉefo d-ro Uebelhör
Ĝeneraldirektoro de National-Bibliothek univ. prof. d-ro Bick
Vicurbestro de Wien Hoss
Univ. prof. d-ro Molisch, membro de Akademio por Sciencoj en Wien
Prof. de Teknika Altlernejo d-ro, d-r' inĝ. Schumann
Ĝen. direktoro d-ro Maschat

**Belgujo:**

Ambasadoro en Wien Le Ghait

**Britlando:**

Sir William E. Clegg, C. B. E., LLD., I. P. Vic-Kanceliero de Universitato Sheffield
Sir Dennison Ross, Profesoro por orientaj lingvoj de Universitato London

**Finnlando:**

Prof. Väinö Voionmaa de Universitato Helsinki

**Germanlando:**

Ambasadoro en Wien Grafo Lerchenfeld

**Italujo:**

Generalo March. Carlo Cordero di Montezemolo, Castiglioncello

**Japanujo:**

Ambasadoro en Wien Morie Ohno

**Esperantujo:**

Leon Belmont-Warszawa
Univ. prof. d-ro Josef Bujwid-Kraków
Prof. Cart, prez. de E.-Akademio, Paris
John Merchant, prez. de ICK., Sheffield
D-ro E. Privat, Honora prez. de ICK., Genève
Generalo Sebert, membro de Scienca Akademio en Paris
John Mabon Warden-Edinburgh
D-ro Leono Zamenhof en Warszawa

## Internacia Kuratora Komitato.

**Aŭstrio:**

Eksdirektoro Schamanek-Tullnerbach

**Belgujo:**

Frans Schoofs-Antwerpen

**Britlando:**

W. E. Collinson, prof. d. germana lingvo kaj

honorofica docento de lingvoscienco en Universitato Liverpool
Prof. J. Flügel en Universitato London

**Bulgarujo:**
Georgi Aktarĝiev-Sofio

**Danzig:**
Anna Tuschinski-Danzig

**Finnlando:**
Konsulo Karl von Frenkell-Dresden
Fil. magistro Vilho Setälä-Helsinki

**Germanlando:**
Poŝtkonsil. Arnold Behrendt-Berlin
Prof. Paul Christaller-Stuttgart

**Germana Ligo en Ĉehoslovakujo:**
Prez. prof. inĝ. Gustav Scholze-Reichenberg

**Hungarujo:**
Julio Baghy-Budapest
d-ro K. de Kalocsay-Budapest
d-ro de Takacs-Budapest

**Italujo:**
Gaetano Facchi-Brescia
Prof. d-ro Bruno Migliorini-Roma

**Jugoslavujo:**
D-ro Dušan Maruzzi-Zagreb

**Nederlando:**
H. J. Bulthuis-Haag
D. Uitterdyk-Hilversum

**Rumanujo:**
Henriko Fischer-Galac en Bucuresti

## Loka Kuratora Komitato:

Reg. kons. Hugo Steiner, fondinto kaj prezidanto
Min.-kons. V. Hawlik, vicprezidanto
Walter Smital, sekretario
Instr. G. Weber, 2. sekretario
D-ro E. Sós, kasisto
Polica kons. L. Buchsbaum
Instruistino M. Dietrich
Provincialo de Piarista Ordeno P. F. Mestan
Instruistino M. Müllner

---

La festotagoj komenciĝis la 30. de julio, sed jam la 29. alvenis granda aro de la pli ol 600 aliĝintoj kaj akceptis siajn kongresaĵojn en la provizoraj ejoj de IEMW. Ilin ĉiujn prezid. Steiner sendis al E.-societo Danubio, kie salutis soc.-prez. Ĉech kaj dankis prof. Bujwid.

Dum la kongrestagoj junaj policistoj deĵoris kun la konata insigno ⟨metala ŝildeto kun inskribo Esperanto kaj verda stelo⟩ sur la peronoj de ĉiuj Wien-aj stacidomoj, por helpi al la alvenintaj gastoj per informoj en E., kaj ankaŭ sur diversaj lokoj, kompreneble ankaŭ antaŭ la kongresejo. De multaj samideanoj estis laŭdata la agado de la Wien-a policdirekcio kaj la lerta E.-informado flanke de la junpolicanoj. Ni Wienanoj estas fieraj pri ĉi tiu juĝo.

Per tramveturiloj la esp.-istoj veturis posttgm. al Prater, je la finstacio de veturiloj ‚L' staris E.-policistoj montrante la vojon al Konstantinhügel, kie la afabla gastejestro ekskapitano Steiger ilin jam atendis kun bonega kafo.

Post la sesa vesp. alvenis la ŝipo el Linz, kiu alportis la karavanon Mosse kaj aliajn samideanojn. Ĉe la ŝipstacio atendis ilin komitatanoj kaj E.-policisto.

Sed ĉiuj, kiuj ne estis tro lacaj, venis en Rathauskeller al komuna vespermanĝo, post kiu prezidanto Steiner korege salutis la gastojn dezirante, ke ili bone amuziĝu kaj travivu belajn tagojn en Wien. La bela »Grinzingerkeller« estis plenplena.

Dumnokte venis karavanoj Drezen, Onnen, Schoofs ktp.

Matene la 31. de julio okazis rondiradoj kaj veturadoj* tra Malnova kaj Nova Wien, poste komuna tagmanĝo en la diversaj Wök-manĝejoj. Ptgm. la kongresanoj ekskursis al kastelrestoracio Kobenzl, de kie ili ĝuis belegan ĉirkaŭrigardon al Wien. — UEPL okazigis kunvenon sub la prezido de prof. Christaller kaj s-ino Isbrücker. Anstataŭante prof. Christaller salutis ⟨pro lia pli forta voĉo⟩ Tauber-Bratislava, lin sekvis en la parolado la prez. de la Wien-a grupo instr. Spitzer kaj ties fondinto kalk. kons. R. M. Frey. — En alia salonego post

* Laŭ gvidlibro »Wien«, ĵus eldonita de Aŭstria Esperantisto-Korneuburg, 64 pĝ., bele ilustrita, havebla kontraŭ antaŭpago de Ŝ 1.50.

fino de la pacifista kunsido teritoria sekr. Bernfeld prezidis kunvenon de la aŭstriaj UEA-membroj.

Kutima fotografado.

Speciale plaĉis al la samideanoj la restado en la bele iluminitaj salonego kaj ĝardeno ĉe »Heuriger« ⟨elverŝejo de lastjara vino⟩ Hengel ĉe la piedo de l' monto, 15 minutojn de Kobenzl. Ĉe Hengel estis komuna vespermanĝo ĉe Wien-a muziko kun kantistoj kaj komikisto; en paŭzo Adalbert Smit-Hago rakontis kelkajn bonajn spritaĵojn, kiujn oni multe aplaŭdis. Longe la samideanoj restis ĉe la bona vino kaj agrabla muziko. – Oni rakontas, ke aro da samideanoj nur per necertaj paŝoj atingis sian hejmon.

La kongresejo, en kiu laboris prez. Steiner, Hovorka, Dr. Matejka, Sperling, Steiner Lothar, Weber kaj f-inoj Haag, Letfuss kaj Weissenböck, ankaŭ la 1. kaj 2. de aŭgusto estis dum kelkaj horoj malfermita kaj ĉiam venis samideanoj ĵus alvenintaj en Wien. – Por helpi al la samideanoj Oesterreichisches Verkehrsbureau ⟨Aŭstria Trafikoficejo⟩, I. Friedrichstrasse 1, disponigis du oficistojn en la kongresejon, kiuj ŝanĝis la monon je favoraj kondiĉoj kaj eldonis biletojn por la veturado per ŝipo kaj fervojo al Budapest.

Brila suno salutis nin je nia granda festotago, la 1. de aŭgusto.

Antaŭ Minoriten-preĝejo atendis la kredantojn du policistoj kun E.-insigno kaj montris la vojon en la preĝejon, kie Katolika Unuiĝo Esperantista estis aranĝinta solenan diservon esperantlingvan. La Sanktan Meson celebris lia pastra moŝto prof. d-ro Christanell, lin asistis liaj pastraj moŝtoj prioro Wolfgang Nedwid, provincialo Franz Meŝtan kaj subparohestro Kudrnowsky. Per »Al kiu mi min turnu?« la multnombra ĉeestantaro ekkantis la tutan belegan Schubert-meson laŭ »Katolikaj Kantoj« de Leopold Chiba.* Antaŭ la konsekrado solkantistino f-ino Werner belege kantis »Ave Mario« laŭ komponaĵo de l' patro de s-ro Chiba. Je la fino oni kantis »Granda Dio, ni vin laŭdas!« Prof. d-ro Franz Christanell, kiu ĵus la 1. de aŭg. antaŭ 25 jaroj celebris sian »Unuan Sanktan Meson«, faris la E.-predikon.

La maniero, kiel li sciis transiri de la eklezia festo de l' tago, festo pro la katenoj de St. Petro, de kiu devenis la relikva kulto katolika, al la festo esperantista, malfermo de la muzeo, faris ĝin majstra verko de la predikarto, kian oni eĉ en nacia lingvo nur tre malofte aŭdas kaj kiun la samideanoj ĉeestintaj certe ne forgesos.

Antaŭ la deka kunvenis la 60 al la aŭdienco ĉe la prezidanto de la respubliko Aŭstrio invititaj komitatanoj, eminentuloj el la movado kaj landaj reprezentantoj en la belega dancsalonego de la prezidantejo.

Precize je la deka la prezidanto, sinjoro Wilhelm Miklas, eniris la salonegon sekvate de l' kanceliero sinjoro Ernst Streeruwitz kaj la direktoro de l' prezidanta kancelario s-ro Klastersky, kiu lasta prezentis prezidanton Steiner al la liglanda prezidanto. La prezidanto donante la manon al s-ro Steiner, diris: »Mi gratulas vin, s-ro registara konsilanto kaj ĝojas, ke mi povis distingi vin.« † S-ro Steiner dankis en sia nomo kaj por la tutmonda esp.-istaro pro la alta distingo, kiu ankaŭ honorigas la esp.-

---

† La kanceliero 6655/Pr.

Al

s-ro ĉefinspektoro de Aŭstriaj Fervojoj en pensio

Hugo Steiner.

Sinjoro la liglanda prezidanto distingis vin per decido de l' 11. de julio nj. rekonante viajn dum la pensiuleco akiritajn meritojn sendepage per la titolo de registara konsilanto.

Pri tio mi vin informas kun miaj plej koraj gratuloj.

26. de julio 1929. Streeruwitz.

---

* Havebla pere de ni kontraŭ antaŭpago: Ŝ 1.50

istaron. Poste s-ro Steiner dankis al la kanceliero pro lia afabla gratulletero kaj ekprezentis ĉiun unuopan gaston. Al ĉiu iliaj moŝtoj prezidanto kaj kancelliero premis la manon kaj diris kelkajn afablajn vortojn. Post la rondirado oni fotografis la prezidanton kaj kancelieron en la mezo de la esp.-istaj gastoj kaj per tio fiksis sur bildo ĉi tiun memorindan momenton, kiam la prezidanto de regno aŭdience akceptis la unuan fojon la esp.-istojn.



La aliaj samideanoj atendis antaŭ la prezidantejo kaj nun ĉiuj kune iris al Nova Urbdomo. La festŝtuparon malsupren ili iris al Festsalonego, kie anstataŭante la urbestron, sinjoron Karl Seitz, akceptis la esperantistaron urba konsilisto Quirin Kokrda, kiun helpis magistr.-ĉefkons. d-ro Asperger kaj nia samideano kalk.-kons. R. M. Frey. S-ro Kokrda gratulis al prez. reg.-kons. Steiner, kiu poste prezentis al li kelkajn eminentulojn el la movado.

Urba konsilisto Kokrda senkulpigis la forestantan urbestron kaj akcentinte la gravecon de E. esprimis sian bedaŭron, ke li ne mem povas saluti la gastojn jam en tiu ĉi lingvo. Tamen li baldaŭ komencos lerni ĝin. Tiu eldiro jam kelkfoje aŭdita de reprezentantoj el lia sfero kaŭzis la intervokon »Tion ni jam kelkfoje aŭdis«. Esperantigis la vortojn s-ro prez. Behrendt-Berlin. — En sia danka respondo nia prez. Merchant esprimis la ĝojon de la gastoj pri la akcepto kaj speciale pri la promeso de la parolinto, lerni E.-on. Humore li komparis sin kaj la akceptinton kun du gvidantoj, inter kiuj troviĝas alta muro, la lingva diverseco. »Je mia flanko jam estas starigita ŝtuparo, laŭ kiu mi jam atingis la supron. De tie mi etendas al vi la manon. Vi, kiu promesis lerni Esp.-on, jam staras sur la unua ŝtupo. Ni esperu, ke ni baldaŭ povu renkontiĝi supre.«

Poste komuna fotografado antaŭ Nova Urbdomo. S-ro Frey invitis al posttagmeza vizito de Urba Muzeo en la nomo de la urbestraro, kiu por la gvidado speciale disponigis oficiston.

De la Urbdomo la samideanoj iris al National-Bibliothek, antaŭ kiu ilin atendis E.-parolantaj policistoj. Meze sub la

kupolo en la 77 m longa, 15 m larĝa kaj 15 m alta Pompsalonego staras statuo, ĉirkaŭ kiu estis starigitaj proksimume 300 seĝoj. Ili kompreneble ne sufiĉis por la tuta ĉeestantaro, kelkcent devis stari. La loko dekstre de la statuo estis rezervita por la oficialaj gastoj kaj maldekstre por la samideanaro. En la mezo malantaŭe estis pupitro por la parolantoj.

Ĉeestis jenaj honorgastoj:

Urba konsilisto Quirin Kokrda, akompanate de mag. ĉefkons. d-ro Asperger kaj kalk. kons. Frey, por landestro de Wien Karl Seitz; d-ro Wilhelm p. landestro d-ro Buresch; por la ŝtatoj brazila ambasadoro Luiz de Limae-Silva, hungara afergvidanto Waldemar Ritter von Alth, itala ĝeneralkonsulo Lodovico Gavotti, pola afergvidanto Konstanty Jelenski, rumana ambasadoro Charles Mitilineu kun legacia sekr. d-ro Zaborowski; episkopo d-ro Seydl p. lia kardinala moŝto d-ro Piffl; episkopo de la Malnovkatol. Eklezio d-ro Tüchler; prez. de izraelida kultunuiĝo en Wien univ. prof. ĝenerala ĉefŝtabkurac. d-ro Pick; ekskanceliero prez. Breisky sekciaj ĉefoj d-ro Uebelhör kaj d-ro Hecht; min. kons. d-ro Schwegel; reg. kons. d-ro Kreuzinger; landa ĝendarmeriestro Hueber; centra insp. reg. kons. Tichy (Poŝtŝparkaso); ĝen. sekr. d-ro Steyrer, reg. kons. Schlag kaj direktoro d-ro Huber (Fervojoj); ĝen. sekr. inĝ. Willfort (Aŭstria Unuiĝo de inĝ. k. arkitektoj); ĝen. dir. Czeija kun direktoroj reg. kons. d-ro Richtera kaj d-ro Nüchtern (Radiokompanio); Blaise-London (Belga Komerca Ĉambro en L.), Rapant (Ĉeĥoslov. Kom. Ĉambro en Wien), prez. Gueritte kaj kons. Le Brun-London (Franca Kom. Ĉambro en L.); reprez. de la Komerc. Cambroj Budapest-a kaj Aŭstria-hungara en Wien; Hoen-Köln (Int. unuiĝo de vojaĝoficejoj-Göttingen); dir. d-ro Naswetter (Austria porfremdula propagandofic.); sekcia eksĉefo Enderes; distriktestro Schober; prof. d-ro V. O. Ludwig, (abatejo Klosterneuburg); poeto d-ro Sonnleitner; muzikdir. Ganglberger; ĉefred. Lippowitz; gazetkorespondantoj José Anglada, Léon Agourtine, John Banister, W. M. Bekaar, d-ro Bungers, Grete Donau, M. W. Fodor, G. E. Gedye, d-ro Grüttefien, H. v. dem Hagen, Joseph Halperson, d-ro Korn, d-ro Maruzzi, Romulo Rocamorra, J. Sapiro, Adalb. Smit, S. Tauber, d-ro Williams.

Senkulpigis sin, plejparte pro foresto, jenaj gesinjoroj:

Lia prezidanta moŝto d-ro Sahm de Libera Urbo Danzig; aŭstriaj ministroj Mittelberger kun edzino, d-ro Slama, d-ro Schürff, Vaugoin kaj Födermayr; prezidantoj de Nacia Konsilantaro d-ro Gürtler kaj Eldersch; deputitoj d-ro Ellenbogen, ekskanc. Hartleb, eksmin. Heinl, Kunschak, d-rino Pichl, Rudel-Zeynek, Tomschik; landestroj d-ro Schlegel kaj anstat. d-ro Schwinner (S. Aŭstrio), d-ro Rintelen (Stirio), d-ro Rehrl (Salzburg), Lemisch (Karintio); landaj kons. d-ro Angerer kaj Winkler (Graz); vicurbestroj de Wien Emmerling kaj Hoss; por la ŝtatoj belga ambasadoro Le Ghait kun edzino, brita amb. Sir Eric Phipps, ĉeĥoslovaka amb. Vavrečka, franca amb. grafo Clauzel, germana amb. grafo Lerchenfeld, japana amb. Ohno kun edzino, maltana grafo Thun-Hohenstein kun edzino, nederlanda amb. Jonkherr van Verduynen, soveta Konstantin Jureneff kun edzino, sveda amb. Ulf Torsten Undén kun edzino; princepiskopo d-ro Pawlikowski; prez. de Protest.-Eklezia Ĉefkonsil. d-ro Kapesius; landaj ĝendarmeriestroj Thienel (Ms. Aŭstrio), Thienel (Stirio), Walter (Tirolio); ĝeneralsekr. Peter; sekciaj ĉefoj inĝ. Gelse, d-ro Hermann, Mell, d-ro Pohl, d-ro Pöschmann, inĝ. Prinz, inĝ. Stampf, d-ro Weinczierl, d-ro Wohlgemuth; ĝen. konsuloj Hlavač, d-ro Schwagula kaj edzino, d-ro Leschanofsky; leg. kons. Blaas; min. kons. d-ro Allgayer, d-ro Augste, d-ro Ballacs, Bayr, d-ro Eckmann, d-ro Karnitschnigg, prof. Komenda, d-ro Mannlicher, d-ro Minibeck, d-ro Perin, Pfersmann, Roth, Scapinelli, Schilder, inĝ. Witt; generaloj Iwanski, Knaus, Königsbrunn, Müller-Eblein, Tarbuk-Sensenhorst, Zimmermann; koloneloj Gebauer, Wächter; prez. Hornik; policprezidanto de Wien ekskanceliero Schober, vicprez. d-ro Pammer (Wien); policdirektoroj d-ro Kunz (Graz), d-ro Scholz (Linz); de la poŝtdirekcioj prez. Habermann kaj vicprez. d-ro Welse (Wien, Ms. Aŭstrio, Burgenland), prez. Almoslechner (S. Aŭstrio kaj Salzburg), prez. d-ro Streng (Stirio); gubern. Bernklau kaj min. kons. d-ro Monschein (Poŝtŝparkaso); kastelestro kort. kons. inĝ. Karajan; de la fervojoj ĝen. dir. inĝ. Foest-Monshoff, dir. inĝ. Heller, min. kons. d-ro Vollhofer, kort. kons. inĝ. Kühnelt, dir Hohenbühel (Linz), dir. Schöpfer (Villach); ĝen. dir. sekcia ĉefo Dorrek (Tabakadmin.); urbaj konsilistoj Richter, d-ro Tandler, Weber; magistr. dir. d-ro Hartl; landaj oficejdirektoroj Karminsky (Ms. Aŭstrio), Attems (S. A.), d-ro Stepantschitz kaj anstat. d-ro Pfusterschmid

---

Numero 10 aperos la 1. de oktobro.

(Stirio); prezidanto de Akademio de Scienc-oj univ. prof. d-ro Oswald Redlich kaj ties vicprez. univ. prof. d-ro Wettstein; rektoroj de universitatoj d-ro Gleispach (Wien), Martinek (Graz), d-ro Wopfner (Innsbruck); teknikaj altlernejoj d-ro Pišek (Brno), d-ro inĝ. Hartmann (Wien); univ. p. bestkuracistoj d-ro Schwarz (Wien); Akademio por belaj artoj Jungwirth (Wien); Minista Altlernejo d-ro Brell (Leoben); Konsulakademio sekcia ĉefo Winter (Wien); prof. de altlernejoj Rudolf Marschall, Conrad, Durig, Luick, Neuburger, Oberhummer, Schaffernak, Reininger, Schumann; reg. kons. dir. Goldberger; landa. lernejinsp. kort. kons. Scheuch kaj Ilg; ĝen dir. kort. kons. Wertheimer (DDSG); prez de kuratorio Homann Herimberg (Dorotheum) vicprez. Breisach (Borsĉambro); Industri-kaj Komercaj Ĉambroj en Berlin, London kaj Paris; Ĉambro p. Komerco, Metioj kaj Industrio prez. Tilgner (Wien); Ĉefunio de Industrio de Aŭstrio; d-ro Müller, Lenarc k. red. Weiss (Komisiono p. Fremdulfrekvento); Smejkal (Gewerkschafts- und Rechtsschutzverein d. österr. Eisenbahnpersonales; fervojista sindikato); vicprez. Drexler (Aŭstria ligeldonejo); organizacio de kuracistoj en Wien; Paneŭropa-Unio; d-ro Danneberg por Partisekretario de la socialdemokrata laborista partio de Aŭstrio; prez. d-ro Reisch kun edzino kaj ĝen. dir. d-ro Brauneis (Nacia Banko); ĉefredaktoroj deput. Austerlitz (Arbeiterzeitung), Braunthal (Das KleineBlatt), d-ro Funder (Reichspost), d-ro Löbl (Neues Wiener Tagblatt), Sahánek (Videnské Delnické Listy), Federn (Oesterr. Volkswirt); kom. kons. Oskar Berl, prez, d-ro Otto Böhler, eksambas. Callenberg, kort. kons. d-ro Donabaum, d-ro Eberharter, kom. kons. Falnbigl, kom. kons. Fross-Büssing, ĝen. dir. Gentilomo, kort. kons. Albert Heine, d-ro Eugen Herz, kom. kons. Hutterstrasser, ĝeneralabato prelato d-ro J. Kluger, prez. von Krasny, Heinrich Lieben, d-ro Maria Maresch, kom. kons. Stephan Mautner, kom. kons. Julius Meinl, d-ro H. Miller-Aichholz, d-ro W. G. Regendanz, prof. Georg Reimers kun edzino, kom. kons. Emil Karpeles-Schenker, ĝen. dir. Schneiderhahn, kom. kons. Richard Schoeller, d-ro Karl Schönherr, d-ro Richard Skene, d-ro Siegfried von Strakosch, dir. Felix Stransky, reg. kons. Johann Wagner, sekcia eksĉefo Weckbecker, prez. Alexander Weiner, Else Wohlgemuth.

Akompanate de ĝen. dir. Bick kaj prez. Steiner eniris la prezidanto de la respubliko kun la ministro por instruaferoj d-ro Czermak la festsalonegon kaj prenis lokon.

La ĝeneraldirektoro de National-Bibliothek univ. prof. kort. kons. d-ro Josef Bick parolis la unua ⟨germanlingve⟩:

»Sinjoro prezidanto, sinjoro ministro,
altŝatataj ĉeestantoj!

Precipe post la detruado dummilita la homaro sopiras je komuna lingvo kiel repacigilo interpopola. Estas por mi sincera ĝojo plejkore saluti, estante ĉefo de ĉi tiu belega domo, vin esperantistojn, la reprezentantojn de ĉi tiu ideo, kiuj kunvenis el ĉiuj landoj eĉ de malproksime por partopreni nian hodiaŭan solenon kaj konstati, kiom ĝis nun progresis la laboroj por la muzeo. National-Bibliothek sin devigis per kontrakto kun la societo »Internacia Esperanto-Muzeo en Wien« certigi al la kolekto indan ekzistadon. Mi estas fiera, ke IEMW trovis sian lokon en National-Bibliothek, kaj estu konvinkitaj, ke nia instituto ĉiel laŭforte akcelos ĝian evoluon. La muzeo estu atestaĵo pri la disvastigo kaj apliko de Esp. Al miaj gratuloj mi deziras alligi la peton, ke vi perage subtenadu la muzeon. La materialo jam enestanta estas enkatalogigata kaj la komitato zorgas pri tiuj laboroj. 60 gazetoj jam estas je la dispono por ĉiuj en la gazetlegejo. Ankoraŭ restas malfacila demando, tiu pri definitivaj ejoj por IEMW. Sed vi povas esti konvinkitaj pri mia sincera klopodo solvi ankaŭ tiun demandon. Por doni resumon pri la jama materialo estis aranĝata la ekspozicio, kiun vi povas vidi en ĉiuj partoj de ĉi tiu salonego. Ĝi instigu vin al subtenado de nia aranĝo. Fine mi deziras, ke la muzeo, kiun ni hodiaŭ solene inaŭguras, servu al ĉiam pli intima interkonatigo de la diversaj popoloj kaj plue, ke ni povu kalkuli je via daŭra kunlaborado.« ⟨Aplaŭdo.⟩

La paroladon tradukis en konate lerta maniero sekretario Smital ⟨Radio-Wien⟩ esperantlingven kaj liajn vortojn sekvis granda aplaŭdo.

Sekvis la festparolado de l' fondinto de IEMW reg. kons. Hugo Steiner, la unua parto en germana lingvo, la dua en Esperanto:

»Altestimata sinjoro prezidanto, ŝatataj gastoj,
karaj samideanoj!

Ĉi tiu antikve inda salonego vidis jam multajn belegajn aranĝojn. Sed verŝajne neniam ĝis nun anoj de 30 nacioj parolis ĉi tie en sia gepatra lingvo kaj unu komuna. Al tiu ĉi komuna lingvo kaj la longa evolua vojo, kiu kondukis al ĝi trans kelkcent projektoj, en la kadro de National-Bibliothek estu konstruata monumento por eternaj tempoj. La mondo facile forgesas

Post malmultaj jaroj ĉi tiu komuna lingvo, nome Esperanto, eble estos jam la memkomprenebla interkomprenigilo ĉie. La kolekto, kies komencon ni solenas hodiaŭ, estu do centro por la studo pri la historio de tiuj evoluaj vojoj. — Egale kiel E. neniel havis facilan vojon, ankaŭ de la unua ideo pri tia kolektejo ĝis ties hodiaŭa stato devis esti superataj multaj kaj grandaj baroj. Sed mi trovis plenan komprenon ĉe vico da eminentaj personoj, kies nomojn mi citos en la dua parto de mia parolado, direktota al la esp.-istoj. Malgraŭ la relative mallonga tempo de kolektado kaj malgraŭ la grandaj distancoj ni povas hodiaŭ transdoni al National-Bibliothek proksimume 2000 diversajn kolekterojn kaj multajn duoblaĵojn — ĉiuj senescepte donacoj. Tio montras plejbone, ke la esp.-istaro la gravecon de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien jam ĝuste taksas kaj ŝatas.«

Tre estimataj samideanoj el la tuta mondo!

De l' unua ideo pri fondo de nia muzeo ĝis hodiaŭ pasis du jaroj, jaroj plenaj de laboro, ĉagreno, malhelpaĵoj venkotaj — venkitaj, post ili kelkaj gutoj de ĝojo.

Starante nun kvazaŭ sur la sojlo de l' hejmo, kiun trovis nia afero en ĉi tiu pompa konstruaĵo, decas, ke ni danke memoru la akcelintojn, al kiuj ni ŝuldas la eblon de l' hodiaŭa soleno. Mi citos ilin en kronologia ordo: La unua, kiu plene komprenis la gravecon de la afero kaj helpis morale kaj age, estis la tiama kanceliero d-ro Ignaz Seipel, lia sekcia ĉefo d-ro Franz Uebelhör estis mia bona anĝelo. Mem multokupata li tamen estiis ĉiam preta helpi, kiam ajn mi bezonis tion. Sinjoro la ministro p. kom. k. trafiko, d-ro Schürff, kiun vi jam konas kiel favoranto de Esperanto laŭ la belegaj gvidfolioj »Tra Aŭstrio« kaj »Aŭstrio«, disponigis al ni provizorajn ejojn kaj lia sekcia ĉefo inĝ. Gelse faris sian plejeblon havigi ilin al ni. Sed ni ne povis hodiaŭ ĝoji pri tiom inda kadro por nia muzeo, se ne la ĝen. dir. de National-Bibliothek univ. prof. d-ro Josef Bick, kiu ĵus salutis vin, en la ĝusta momento estus propradecide akcelinta la projekton per propono al la tiama ministro por instruaferoj Schmitz, aligi la muzeon al sia instituto. En tiu momento malaperis miaj zorgoj pri la finaca flanko kaj la tiel nomata »**privata**« afero estis iĝinta »**stata**«.

Nia altŝatata prezidanto de la respubliko, sinjoro Wilhelm Miklas tuj post sia elekto estis petata akcepti la protektoraton pri nia muzeo. Tuj kaj afable sinjoro la prezidanto akceptis kaj promesis subteni nian aferon.

La unuan parton de nian kolekto ni ricevis de la vidvino de nia meritplena kolonelo Zwach, sekvis parto el la postlasaĵo de niaj pioniroj Schröder kaj Hartwich. Unua Esperanto-Unuiĝo en Wien laŭ propono de d-ro Sós donacis sian tutan bibliotekon — proksimume 700 librojn —, sekvis malavara donaco de nia aŭstria pioniro F. J. Schade (300 libroj), donacoj de l' eldonejoj Heroldo de Esperanto kaj Ellersiek, de prof. Christaller, Uitterdijk, Bulthuis, Itzgur, Laborista E.-Asocio, Brita E.-Asocio, generalo Rambousek, Itala E.-Federacio, japanaj kaj multaj aliaj samideanoj.

Ilin ĉiujn mi dankas k. petas, ke ili daŭrigu sian helpon por komuna verko. Same kiel en Aŭstrio ĉiuj eldonejoj, verkistoj, gazetoj ktp. estas devigataj sendi al National-Bibliothek po du kaj pli ekzempleroj de noveldonaĵoj, ankaŭ la samideanoj ĉu verkistoj, eldonejoj de libroj aŭ gazetoj sentu la devon, sendi nur po unu ekzemplero al Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. La unuopuloj sendu materialon kaj moneroin, kiujn ni bezonas por la afranko kaj malgrandaj elspezoj. Do neniu postrestu!

Finfine elkore dankante al ĉiuj akcelintoj ĉu neesperantistoj, ĉu esperantistoj — mi ne povas forgesi miajn pliintimajn kunlaborantojn: Sinjoron Smital, kiu aranĝis ankaŭ la ekspozicion, s-ron Weber, f-inon Diettrich kaj mian filon Lothar (Granda aplaŭdo).

Lian prezidantan moŝton mi petas, afable malfermi Internacian Esperanto-Muzeon en Wien.

Ekstaris la ambasadoroj. Sinjoro la respublika prezidanto Wilhelm Miklas aliris akompanate de sinjoro Steiner la pupitron por malfermi la muzeon. Senbrua silento regis en la vasta salonego. Klare, akcentante ĉiun vorton la prezidanto diris en germana lingvo:

»Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj!

El pli ol 30 ŝtatoj de la tero vi, tre estimataj gesinjoroj, ĉi tie kunvenis por interkonsiliĝi pri E.-aferoj.

Certe la plejebla disvastigo kaj plejĝenerala rekono de genie elpensita lingvo artefarita estas treege dezirinda. Ĝi estu ja valorega interkomprenigilo por homoj ĉiulingvaj. Plenumante ĉi tiun taskon E. servas ne nur al la interkompreniĝo de homoj diverslingvaj en la praktika vivo, sed samtempe ĝi akcelas ankaŭ la interŝanĝon de la spiritaj bonoj de l' homaro, de ĝiaj ideoj kaj opinioj en la kampoj kultura kaj ekonomia. Sed ĉio, kio akcelas la reciprokan kompreniĝon inter la popoloj, ankaŭ la rimedo de lingvo facile lernebla de ĉiuj kaj komprenata ĝenerale estas plejvarme salutinda. Certe ĉiu lingvo per si mem egale povas servi al malamo kiel al amo. Sed la praktika sperto instruas nin, ke plia interkompreniĝeblo de la popoloj servas fakte pli multe al la paco ol por batalo. Tio

estu ankaŭ la celo de E., iĝi rimedo por la paco inter la popoloj de l' tero. Nenion alian ankaŭ volas kaj aspiras Aŭstrio kaj tial vi estas al ni kore bonvenaj ĉi tie en la bela ĉefurbo de nia aŭstria respubliko.

Feliĉon indikanta antaŭsigno ŝajnas al mi esti, ke vi la ĉefkunvenon de via nunjara antaŭkongreso efektivigas tie ĉi en ĉi tiu pompa salonego de l' aŭstria ŝtata biblioteko. Ĉi tiu brila ejo estas ja ne nur unika trovloko por scio kaj klero entute, sed ankaŭ samtempe monumento de malnovaŭstria grandeco kaj dokumento de l' spirita kaj speciale artista kulturo de ĉi tiu lando. La Esperanto-Muzeo, kiun vi instalis en ĉi tiu belega loko, certe povas atenti la daŭran intereson de kleraj homoj el ĉiuj rasoj kaj klasoj, de ĉiuj regnoj kaj lingvoj. Estante kolektejo ĝi certe estas destinita ludi ankoraŭ gravan rolon en la spirita vivo de la popoloj kaj havigos al nia lando multajn amikojn en ĉiuj partoj de la tero. Plenumu ĝi la taskon, kiun starigis ĝiaj kreintoj por ĝi. Sed vin ĉiujn, venintaj kiel karaj gastoj al ni, mi plej afable salutas en la bela urbo Wien, en kiu vi sentu vin bonege kaj bonvenigas vin ĉiujn en la nomo de Aŭstrio elkore.«

Per la lasta frazo en E. lia prezidanta moŝto malfermis IEMW jene:

»Dirante al niaj karaj gastoj koran bonvenon en Aŭstrio, mi deklaras la Internacian Esperanto-Muzeon malfermita.«

La intensan, longe daŭran aplaŭdon, kiu sekvis al tiuj vortoj, ne nur kaŭzis la fakto, ke la regnestro malfermis en Esperanto, sed ankaŭ la maniero, kiel li precize prononcis ĉiun vorton.

Streĉe atendis la esperantistoj la tradukon de la germana parolado, kiun taskon Smital bonege efektivigis. Brua longdaŭra aplaŭdo sekvis.

Nova aplaŭdondo trasonis la ejon, saluto de la ĉeestantaj esp.-istoj al la filino de l' Majstro. D-rino Lidja Zamenhof ekparolis:

»Tre estimata sinjoro prezidanto,
karaj gesamideanoj!

Kun sinsera ĝojo mi sekvis la inviton veni al Wien pro la malfermo de IEMW. Ĉi tiu bela urbo entenas multajn muzeojn kaj aliajn kolektojn en belegaj konstruaĵoj. Sed rigardante ties vizitantojn oni povas rimarki, ke ili ofte tramarŝas la trezorejojn kun pli malpli enua mieno. Tromulto da belaĵoj ja ankaŭ povas enuigi. Mi estas tute konvinkita, ke ĉi tiu muzeo faros la vizitantoj tute alian impreson, ili ja serĉos kaj trovos tie ĉi evoludokumentojn de afero, kiu estas proksima al iliaj koroj. Al tiu grava kolekto ankaŭ mi deziras pagi modestan tributon kaj transdonas por la muzeo manuskripton de mia patro skribitan en la jaro 1881. La teksto ja ne estas konforma al la nuna Esperanto, sed montras ankoraŭ la tiaman formon de la Lingvo Internacia. Migru do kara kajero, kiu longe kuŝis en tirkesto inter aliaj antikvaĵoj, en la mondon kaj prezentu vin kiel atestanto de diligenta homo, kiu oferis la laboron de siaj solecaj horoj al la interkomprenigo de l' homaro. Mi deziras al vi, ke vi vidu tie ĉi en la muzeo nur ĝojajn mienojn kaj amikajn vizaĝojn.«

Ankaŭ tiun vigle aplaŭditan paroladon Smital tradukis, nun germanlingven.

La kajero enhavas tradukprovon el »La rabistoj« de Schiller.

La ĉefo de la familio doktoro Leono Zamenhof, malhelpita veni, sendis jenan leteron, kiun Smital voĉlegis:

Julio 1929.

Ni alproksimiĝas rapide al duonjarcento depost la tempo, kiam Esperanto starigis siajn unuajn necertajn paŝojn.

Tia tempospaco eble estas nur ero en la historio de la tutmondo sed en la vivo de ideoj ĝi estas granda periodo.

La ideoj ne estas aĵoj materiaj, anigeblaj en iajn rigidajn formojn.

Lingvo internacia, kvankam posedas eksteraĵon materian, tamen kiel spiritdeveno teorie devus ankaŭ subiĝi al tiu ĉi leĝo de l' naturo.

Se la lingvoj vivantaj ne povas konservi sian konstruon senŝanĝe, des pli estus malfacile postuli tion ĉi de la lingvo internacia, dependanta ne de unu nacio, sed de multaj kontraŭaj laŭ moroj kaj pensmanieroj homareroj.

La unuaj provoj kun la lingvoj internaciaj tute konformis tiun ĉi hipotezon. Ili ĉiuj ne ĝisvivis eĉ la plej fruan sian infanecon.

Kontraŭvole naskiĝas demando, kiel Esperanto ne subiĝis al tiu ĉi ŝajne nerompebla leĝo? Ne mankis ja projektoj, kiuj penis preni sur sin la taskon de tiu ĉi natura evoluigado.

Kaj tamen ili ĉiuj rebatiĝis de la forta konstruo de Esperanto.

Per kio klarigi tiun ĉi rigidecon de nia lingvo? Ĉu per ĝia perfekteco aŭ la malperfekteco de la plibonigaj projektoj.

Supozeble el la ambaŭ.

Sed tio ĉi tamen ne estas sola, al kio Esperanto ŝuldas sian senskuan ekzistadon.

Ĝi ŝuldas ĝin en grandega grado al la neŝanceliĝema spirito de tiuj, kiuj oferis al ĝi

parton de sia propra animo, al tiuj, kiuj kune kun la majstro per siaj inspiritaj verkoj penis fari el la arta kreitaĵo vivkapablan organismon, al tiuj, kiuj ne hezitis adopti ĝin kiel preskaŭ duan patrolingvon.

Ili montris, ke la plej alta revo de l' homaro — lingvo internacia ne estas utopio, kondiĉe, ke la homoj ne komprenu ĝin kiel objekton de spekulacia filozofio, sed de reala neceso.

La unuaj pioniroj — jen al kiuj ŝuldas Esperanto la inokulitan al si vivon kaj la hodiaŭan triumfon! Kie ili estas nun tiuj ĉi neforgesindaj samideanoj?

La pliparto jam plu ne vivas. La terura milito al multaj mallongigis la vivon, aliajn disĵetis en diversajn angulojn de la terglobo.

Ne ofte ni vizitas iliajn eternajn ripozejojn!

Por ni ili ne mortis! Ili daŭrigas kune kun ni nian komunan laboron al la fina venko de la ideo!

Mortis iliaj korpoj, sed restis vivaj iliaj spiritoj — la neelĉerpebla fonto de inspiroj.

Tiu ĉi mistero de ilia senmorteco kuŝas en la perfekteco de la verkoj postlasitaj de ili, verkoj, kiuj ĝis nun ne nur mirigas nin, sed ankaŭ fruktigas al la daŭro kaj nova kreado! Jen a kiuj Esperanto ŝuldas sian rigidecon kaj fortan konstruon!

Malfermante hodiaŭ nian unuan muzeon, ni ne forgesu pri la gravega rolo de tiuj, kiuj ne sukcesis ĝisvivi la hodiaŭan ĝojigan tagon. Estu nia muzea ne nur senviva kolekto de ĉio, kio vivis kaj vivos en Esperanto, sed ankaŭ almenaŭ modesta panteono por tiuj, kiuj la unuaj ne hezitis oferi al ĝi la parton de sia vivo, ofte la plej bonan.

Ni repagu per la samo kaj oferu al ili la plej honoran parton de nia muzeo!

Gloro al ilia neforgesebla memoro!

Leviĝis la ĉefo de la esp.-istaro, prez. de ICK s-ro John Merchant, kiu sidis dekstre de l' prezidanto de la respubliko kaj la ministro por instruaferoj. Multe impresis la honorgastojn la enhavo de lia samtempe afereca kaj elokventa parolado:

»Altŝatata prezidanto, estimata ĝeneraldirektoro!

En la nomo de ICK mi deziras esprimi al s-ro la prezidanto nian profundan dankon pro la neforgesebla grandioza, serioza servo, kiun li hodiaŭ faris al nia afero. La vortoj, kiujn li al ni direktis, ne estos nur konataj kaj ĥataj de la gazetaro en la urboj de Aŭstrio. Li hodiaŭ parolis al la tuta mondo. Ĉar ni esp.-istoj certe ripetos hejme, kion la aŭstria prezidanto diris. Ni esp.-istoj ja solaj posedas la povon, transigi iajn vortojn al la tutmondo per nia komuna lingvo. Al s-ro ĝen. dir. de la ŝtata biblioteko ni diras specialan dankon. Li menciis en sia parolado la suferojn de Aŭstrio en kaj post la milito. Estu ambaŭ konvinkitaj, ke vi per viaj vortoj hodiaŭ gajnis milionojn da novaj koroj por via bela lando. Jam alvenis materialo, gute kvazaŭ. Same kiel la pluvo gute falas de la ĉielo kaj via granda Danubo la akvoamason transportas al la maro, tiel el ĉiuj landoj alvenos la Esp.-sendaĵoj kaj ni esperas, ke post kelkaj jaroj ankaŭ via granda biblioteko ne sufiĉos por ĉiujn enteni. Sed eĉ tiam, kiam la esp.-aĵoj abundos en la mondo, oni neniam forgesos la grandan meriton de Aŭstrio, kiu la unua entreprenis kolekti ilin. Pro tio mi opinias, ke vi sincere vokos kun mi ‚Vivu prezidanto Miklas, vivu ĝeneraldirektoro Bick, vivu la respubliko Aŭstrio!'«

Entuziasmaj vivkrioj rezonis de la or- kaj marmortegitaj muroj.

Intertempe estis alveninta jena E.-telegramo, kiun prez. Steiner komunikis al la festkunveno: »Kun sincera ĝojo ni salutas Internacian Esperanto-Muzeon. Sofio, Adam, Wanda Zamenhof.«

Nome de ges-roj Sergeant-Boulogne s/m s-ro Deligny-St. Omer transdonis la unuan ekzempleron de la E.-flago, signita kaj datumita de d-ro L. L. Zamenhof, la 5. de aŭgusto 1905. La flago estas kreita de la grupo de Boulogne s/m, elpensita de s-roj Michaux, Sergeant kaj Duchochois por la I. Kongreso kaj aprobita de la I. Universala Kongreso de Esperanto por la tuta esperantistaro, la 9. de aŭgusto 1905, per unuanima voĉdono.

La unuiĝoj »Ĉiam Antaŭen«, »Fine ĝi venkos«, »Por Dio kaj eklezio« kaj »Zamenhof« kaj 21 izolaj esp.-istoj el Hago donacis al IEMW vivsimilan oleopentraĵon, portreton de nia majstro, pentritan de la fama flandra artisto s-ro Achilles De Maertelaere Bentos en Gento. En ĉeesto de la verkinto inĝ. Onnen transdonis la altvaloran donacon kun edifaj vortoj.

Nome de nia honorkomitatano polica prezidanto de Wien s-ro Johann Schober prezentis la polica distriktinspektoro F. Gaidosch kun du E.-policistoj subvitran

tabulon, sur kiu estas fiksitaj la prilingvaj insignoj de deĵorantaj policistoj en Wien, kiel donacon por IEMW.

Sekvis mallongaj alparoloj de:

Vicprez. Karsch por UEA

Lia pastra moŝto Fr. Meŝtan por IKUE

F-ino Martha Root-New-York p. Bahaa-movado

Red. Theo Jung, eld. de Heroldo de E., en la nomo de la E.-gazetaro.

En alfabeta sinsekvo salutis la landaj reprezentantoj per po unu frazo en sia nacia lingvo kaj Esperanto:

Alĝerio: s-ro Couffinhal-Relizane
Belgujo: s-ro Schoofs-Antwerpen
Britlando; s-ino Blaise-London
Bulgarujo: s-ro Tričkov-Vratza
Ĉeĥoslovakio: s-ro Hub-Gablonz p. la germ. prof. Jukl-Bratislava p. la ĉeĥoj.
Danlando: s-ino Melchior-Kobenhavn
Danzig: f-ino K. Marquart-Danzig
Estonio: f-ino Lübek-Tallin
Finnlando: konsulo von Frenkell
Francujo: s-ro Dubois-Paris
Germanlando: poŝtkons. Behrendt-Berlin
Hispanujo: s-ro Rocamorra-Barcelona
Hungarujo: s-ro Kovacs-Rakoszentmihaly
Italujo: s-ro Facchi-Brescia
Japanujo: s-ro Oka-Tokio
Katalunujo: s-ro Anglada-Barcelona
Latvio: s-ino Juŝen-Riga
Nederlando: inĝ Isbrücker-Haag
Polujo: univ. prof. d-ro Bujwid-Kraków
Bialystock: s-ro Ŝapiro
Rumanujo: s-ro Fischer-Bucuresti, samtempe reprezentante la ministeriojn p. Internaj kaj Komercaj Aferoj
Saarteritorio: d-ro Meyer-Saarbrücken
Skotlando: s-ino Baird-Edinburgh
Sudslavio: docento d-ro Maruzzi-Zagreb
Svedlando: s-ro Dahl-Udevalla
Svislando: d-ro Spielmann-Bern
Transvaalo: s-ino Spiro
Usono: s-ro Hamann-Wauwatosa.

La neesperantista publiko ne nur pacience sed kun streĉa intereso sekvis la tiom diverslingvajn alparolojn.

Fine prez. Steiner petis la protektoron de IEMW malfermi la ekspozicion kaj preter la ekspoziciaj kestoj akompanis lian prezidantan moŝton al la elirejo.

---

Pri la XXI. ni raportos en la venonta numero.

La celo de la ekspozicio estis montri al niaj gastoj almenaŭ parton de la muzea materialo. En 46 kestoj ŝlosita sub vitro estas videbla proksimume triono de la ĝisnunaj donacoj. En la unua parto troviĝas la dokumentoj pri projektoj de L. I., kiujn grandparte National-Bibliothek transigis al IEMW. La dua parto montras la divastiĝon de E. antaŭ la unua kongreso, unuajn propagandilojn, lernolibrojn, vortarojn. Tria parto enhavas en alfabeta ordo laŭ landnomoj kaj en tiuj grupoj laŭ aŭtornomoj la nacilingvajn lernolibrojn. Apartan grupon formas la vortaroj internaciaj, E.-naciaj, fakaj. En pluaj 8 kestoj prezentiĝas dense kunmetitaj po unu ekzemplero de ĉiu E.-gazeto, simile subdividitaj. La aplikon de la lingvo evidentigas la dua duono de la ekspozicio, kies subgrupoj estas: korespondado kaj adresaroj, organizaj dokumentoj kaj jarlibroj, foiroj, komerco kaj trafiko, turismo, etnografio, socia movadoj, religio kaj filozofio, scienco,j muziko kaj fine vico da 8 kestoj en tenantaj tradukitan literaturon diversnacian ⟨en subgrupoj prozo, dramarto, liriko⟩ kaj originalan literaturon. Ĉi tiun grandan kaj malfacilan laboron la sekretario de IEMW s-ro Smital devis plenumi en relative tre mallonga tempo. Helpis lin f-ino Diettrich kaj Lothar Steiner.

La ekspozicio restos ĝis malfrua aŭtuno, por ke la societoj havu la eblon okaze de lia kurspropagando inviti varbotojn al vizito. Detaloj estos en la ĵurnaloj.

☆

Raportis la tuta Wien-a ĵurnalaro escepte »Arbeiterzeitung«, »Deutsch-österreichische Tageszeitung«, »Wiener Neueste Nachrichten«, kaj »Freiheit«. Sed grandajn artikolojn publikigis »Neue Freie Presse«, »Neues Wiener Journal« kaj speciale detale raportis dum kelkaj tagoj »Volkszeitung«, »Kleine Volkszeitung« kaj »Das kleine Volksblatt«, la lasta pere de s-ro Bischoff.

**Ĵus alvenis granda kesto ⟨65 kg⟩ kun materialo de UEA-Ĝenevo.**
**Dankon al direktoro Hans Jakob.**

---

Diskonigu pere de E.-gazetaro kaj en viaj rondoj la enhavon de ĉi tiu numero, varbu por IEMW, sendigu al ĝi materialon kaj monon. **Nova adreso: Internacia Esperanto-Muzeo, ĉe National-Bibliothek, Wien, I. Aŭgustinerstrasse 7.**

---

## Konferenco de TEKA.

La jam alvenintaj kuracistoj vizitis la 30. de julio diversajn klinikojn. La 31. ili sub la prezido de d-ro Robin-Warszawa havis sian ĉefkunvenon en la prelegejo de l' kliniko Pichler en Allgemeines Krankenhaus. D-ro Sós-Wien en sia germana parolado al la ĉeestantaj kuracistoj akcentis la popolojn interligantan rolon de komunaj sciencaj entreprenoj precipe kiam ili okazas helpe de lingvo samtempe komprenata de ĉiuj samfakanoj. Prez. d-ro Robin komunikis, ke la E.-kuracistoj de nun havos ĉiujare apartan kongreson en universitata urbo. En la nomo de l' urbestro salutis docento d-ro Friedjung kaj invitis al vizito en la urba domo kaj bonfartigaj institutoj. El la scienca programo menciinda estas la prelego de d-ro Bagdagli-Odessa pri »Frua diagnozo de la gravedeco sur vojo biologia«. Pttg. vizito al la infantransprenejo de komunumo Wien.

### Gravaĵoj.

**Pollanda Ekspozicio Ĝenerala** en Poznan ⟨16. V.—30. IX.⟩ invitas per belega, ilustrita, 4 pĝ. E.-folio al vizito. Österr. Handelsmuseum aranĝos de l' 14.—19. aŭgusto ekskurson al la ekspozicio je la ege malmultekosta prezo de Ŝ 108.—, en kiu sumo estas enkalkulata la veturado per rapidtrajno en tria klaso al Poznan kaj reen, vizo, tritaga restado en Poznan kun loĝado en puraj plurlitaj ĉambroj kaj potage trifoja bona manĝado, ĉiuj eniroj al ekspozicio, muzeoj, urbdomo ktp., gvidadoj ktp. En Poznan la esp.-istoj atendos la karavanon. Informojn donas inĝ. K. Brunak, Wien, VI. Millerg. 40, ⟨tel. B 25-0-76⟩.

**Vizitu Pollandon,** bela 16 paĝa propagandilo kun landkarto de Pollando kaj 13 bildoj. Eld. de Pola E.-Asocio, subvenciita de la Ministerioj de Eksterlandaj Aferoj, de Publikaj Laboroj kaj Komunikacio, 1929. Senpage ĉe Pola E.-Delegitaro, prez. prof. Odo Bujwid, Kraków, str. Lubicz 34.

## Rimarkindaj presaĵoj.

**Gvidlibro »Wien«,** kompilita de reg. kons. Steiner, fondinto de »Intern. E.-Muzeo en Wien«, ĵus aperis. Bele ilustrita. 64 pĝ., prezo Ŝ. 1.50 kontraŭ antaŭpago. Mendu ĉe nia gazeto A. E.

### Miraklaj aventuroj de s-ro Longkrurulo.

Amuza historio kun 152 bildoj kaj 162 strofoj rime eldonate de Dreves Uitterdijk, L. K.

Rekomendita de E.-Literatura Asocio. Mendu ĉe ni: Prezo kun afranko ⟨kontraŭ antaŭpago⟩ por abonantoj aŭ. Ŝ. 3.50.

**Internacionalstenografio** en ĉiuj kulturlingvoj. Aldono por la Gvidilo en E. Enkonduko kaj tri partoj de F. de Kunovski. Enkonduko ⟨4 pĝ.⟩ kaj 1-a parto ⟨14 pĝ.⟩ ⟨Germana, Angla, Franca, Hispana, Itala, Pola, Rusa.⟩ Eldonejo: Instituto de Internacionalstenografio, Duisburg, Friedenstr. 79, Germanujo. 14×22 cm. Prezo 1·— RM po libreto.

La kunfondinto de l' germana stenografisistemo »Nationalstenographie«, F. de Kunovski, plue transformis tiun sistemon al »Internacionalstenografio.« Ĝi signas la vokalojn per malsupren-, la konsonantojn per suprenstrekoj. Tiu ĉi principo ne venkis ĉe la germanoj pro la neeviteblaj mankoj, kiun ĝi havas. ⟨Aliaj formoj de samaj signoj en kunligoj, disigo de unuopaj vortoj, tamen t. n. »etaĝ-vortbildoj«, neekzistanta kontakto kun la skriblinio, manko de rapideco k. a.⟩ Estas do preskaŭ ne supozeble, ke la sistemo kiel »Internacionalstenografio«, bezonante multe pli da signoj ol iu nacia sistemo, estos sukcesplena.

Stenografio unuavice emu al la skriblinio. Ĝi povas atingi la plej altan gradon de klareco kaj rapideco nur tiam, se ĝi konsideras plejeble la proprecojn de la diversaj lingvoj, precipe ties soninterrilatojn. Sed tiuj ĉi estas en la diversaj lingvoj tre diversaj kaj pro tio ĉiu »Internacionalstenografio« por ĉiuj kulturlingvoj devas esti nebona. Karl Haager.

---

Pro manko da loko raportoj en n-o 10.

Verlag Paul Knepler ⟨Wallishausser'sche Buchhandlung⟩ Wien I.
Lichtensteg 1.

# Esperanto-Parolekzercaro

für österr. Haupt- und Mittelschulen nach Bildern von Hölzel
von Dir. Fritz Stengel

Mit 9 Bildertafeln in eigener Mappe

103 Seiten **Preis S 2·40** Steif kartoniert

## Vollständiger Lehrgang der internationalen Hilfssprache ESPERANTO

Von Glück und Dr. Edmund Sós

21.–30. Tausend. Kartoniert S 1·70 ⟨Mk. 1.–⟩

| | |
|---|---|
| Poeziajoj, Schiller ⟨2a nova eld.⟩ – Zwach | S 1·20 |
| Esperanto-Deutsche Sprach-Bibliothek von Dr. E. Pfeffer ausgewählte Esp.-Lektüre für Anfänger und Kurse | „ –·60 |
| Bonsels, Ŝolandro | „ 1·50 |
| Koudenhove-Kalergi, Paneŭropa Manifesto | „ –·60 |
| Esperanto-Schlüssel | „ –·30 |
| Esperantokarten ⟨Wiener Ansichten⟩ | „ –·20 |

**Sämtliche auf dem Gebiete der Esperanto-Literatur erchienenen Bücher stets lagernd.**
Katalog auf Wunsch gratis.

# ESPERANTO-LITERATURO

**Bennemann, Paul, Tra la Mondo.** Internacia Legolibro. I. Por komencantoj. 4a eld. 96 paĝoj. 1929. S 2·50
II. Por progresintoj. Kun aldono de 4 komponajoj. 144 paĝoj. 1922 S 3·75

**Delsudo, A. kaj Laiho L., Aŭstralio. Lando kaj Popolo.** Plej interesa orig. verko kun 31 ilustr. kaj landkarto. Luksa tolbind S 11·—

**Forge, Jean. Abismoj.** Romano originale verkita. 1923. 150 paĝoj. Broŝurita S 5·10, Bindita S 7·65

**— Saltego trans jarmiloj.** Romano originale verkita. 192 paĝoj. 1924. Bindita S 8·50

**Luyken, H. A. Stranga heredajo.** Romano origin. verkita. 1922. 320 paĝoj. Broŝurita S 9·35

**— Pro Ištar.** Romano el la antikva Babela historio. 1924. 304 paĝoj. Bindita S 12·—

**Privat, Edmond. Historio de la lingvo Esperanto. Ia parto.** Deveno kaj komenco 1887–1900. 2a eldono 1923. 74 pĝ. Kart. S 2·70, Bind. S 4·25

**— — IIa parto.** La Movado 1900–1927. 200 paĝoj. Bindita S 10·—

**— Vivo de Zamenhof.** Kun portreto de d-ro L. L. Zamenhof. 1923. 109 paĝoj. Kartonita S 4·25
— — — — Bindita S 6·—

**Raimund, F. La Maišparulo.** Orig. sorĉfabelo, tri aktoj, trad. de F. Zwach. 97 paĝoj. Multkolora bind. S 3·40

**Wagnalls, Mabel.** Palaco de Danĝero. Rakonto pri Madame la Pompadour. Tradukis el la angla originalo de Edw. S. Payson. Luksa tolbindajo S 10·—

## INTERNACIA MONDLITERATURO

Vol. 1. **Goethe.** Hermano kaj Doroteo. ⟨Dietterle⟩
Vol. 2. **Niemojewsky.** Legendoj. ⟨Kuhl.⟩
Vol. 3. **Turgenev.** Elektitaj Noveloj. ⟨Merin.⟩
Vol. 4. **Raabe.** La nigra galero. ⟨Wicke.⟩
Vol. 5. **Hildebrand.** El la Camera obscura. ⟨Mees.⟩
Vol. 6. **Irving.** El la Skizlibro. ⟨Elvin.⟩
Vol. 7. **Chamisso.** La mirinda historio de Petro Schlemihl. ⟨Wüster.⟩
Vol. 8. **Stamatov** Nuntempaj rakontoj. ⟨Krestanoff.⟩
Vol. 9. **Salom-Alehem-Perec.** Hebreaj rakontoj. ⟨Mučnik.⟩
Vol. 10. **Puŝkin.** Tri noveloj. ⟨Fišer.⟩
Vol. 11–12. **Arišima.** Deklaracio. ⟨Tooguu.⟩
Vol. 13. **Poe.** Ses noveloj. ⟨Milward.⟩
Vol. 14. **Balzac.** La firmao de la kato, kiu pilkludas. ⟨Benoit.⟩
Vol. 15. **Doroševič.** Orientaj fabeloj. ⟨Hohlov.⟩
Vol. 16. **Sienkiewicz.** Noveloj. ⟨Zamenhof.⟩
Vol. 17. **Strindberg, August.** Insulo de feličnloj. ⟨O. Frode.⟩
Vol. 18. **Bertrana, Prudenci.** Barbaraj poeziajoj. Josafat. ⟨J. G. Casas.⟩
Vol. 19. **Simunovič, Dinko.** Ano de l' ringludo. ⟨F. Janjič.⟩
Vol. 20. **Eckhoud, Georges.** Servokapabla. Marcus Tybout. ⟨L. Bergiers.⟩
Vol. 21. **Sadeveanu M.** Nobela Peko. ⟨F. Morariu.⟩

La kolekto estas daŭrigata.
Prezo po vol. S 2·70; po 5 vol. laŭ elekto S 10·20
Prezo de duobla volumo S 4·25

**Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako, Leipzig, Salomonstr. 15**
**Deponejo kaj Ekspedejo por Aŭstrio kaj Hungarlando:**
**Buchhandlung Rudolf Foltanek, Wien, I. Herrengasse 2–4, Telephon U 20-8-44**


Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Bisamberg 248.
Presejo: Franz Reifmüller, Wien, I, Johannesgasse 6